# Ĉu tiu, aŭ tiu ĉi? - Interkoniga ludo

(Pli rapida variaĵo de la ludo, "Kiu faras tion?" troviĝanta en la LERNILOTEKO)

**Celgrupo:**

La ludo taŭgas por komencantoj, lingve ĝi estas simpla, kaj postulas la kreadon nur de unu frazo kaj komprenon de aliaj simplaj frazoj. (Spertuloj povas helpi komencantojn).

**Bezonataj aferoj**: unu papera slipo por ĉiu persono kaj multaj skribiloj.

- Ĉiu persono skribu interesan fakton pri si, kiun multaj homoj ne scias.
  Donu eblajn frazmodelojn al la grupo, ekzemple:

  *"Mi kreskigas ducent kilogramojn da tomatoj ĉiu-somere."*
  *"Mi posedas pli ol kvincent librojn en Esperanto."*
  *"Mi havas gefratojn, kiuj estas ĝemeloj."*
  *"Mi iam vizitis Nepalon."*
  *"Mi ŝatas popoldanci."*

- Post la skribado ĉiuj retenu la propran slipon.
- Vi, la gvidanto, starigu du seĝojn antaŭ la grupon kaj voku du homojn al la seĝoj. Ne gravas kiujn. Tiuj du prezentu sin al la grupo: "*Mi nomiĝas Petra*." "*Mi estas Adriana*."
- Prenu la slipojn de tiuj du personoj, kaj elektu unu el la slipoj.
- Legu tiun slipon al la grupo.
- Demandu al la grupo, ĉu la frazo veras por tiu (indikante unu el la sidantoj, kaj redirante ties nomon) aŭ por tiu-ĉi (indikante la alian, kaj denove, redirante ties nomon).
- Ĉiuj, kiuj supozas ke la frazo estas vera pri persono A (Petra, en la ekzemplo), formu vicon anta tiu persono. Ĉiuj, kiuj supozas, ke la frazo estas vera pri persono B (Adriana, en la ekzemplo), formu vicon antaŭ tiu. (Ĉiuj, kiuj ne kapablas decidi, « hontu », kaj elektu laŭ hazardo).
- Post la enviciĝo, la gvidanto petu ke la sidanto, kiu skribis la frazon, ekstaru. Redonu la ne-legitan slipon al ties skribinto, kaj formetu la legitan slipon.
- Sendu tiujn du reen en la grupon, kaj venigu du aliajn al la seĝoj.
- Venu al la seĝoj nur tiuj homoj, kiu havas ankoraŭ sian slipon.

**Finfine**, restos nur du homoj (ne gravas ĉu la grupo havas paran aŭ neparan kvanton, je la fino, restos du homoj kun slipoj).

- Tiam, legu unu slipon, kaj lasu al la grupo viciĝi laŭ la kutima maniero.
- Post la enviciĝo, legu la alian slipon, kaj demandu al la grupo, ĉu, surbaze de tiu nova informo, iu deziras ŝanĝi sian opinion pri tiu, kiu skribis la unuan frazon.

- Donu tempon por eblaj rearanĝoj, kaj poste petu ke la skribinto de la unua frazo ekstaru.

Homoj samtempe ekscios la veron pri la unua frazo, kaj ekscios kiu skribis la duan frazon. Tiam, la ludo finiĝas.

**********************************

Por kapti la okazon ankaŭ por **lingva ekzerco** konklude vi povas ripetigi la informojn en diversaj strukturoj el kiu la partoprenantoj elektu alterne aux lauxvole. :

"Mi ĵus eksciis, ke Derek iam vizitis Nepalon. "

"Mi neniam sciis, ke Derek vizitis Nepalon. "

"Mi neniam imagis, ke Derek vizitis Nepalon".

ks